

HUNGÁRA VIVO

SALCÓTARJÁN



sen demandosignoj) de la movado en Sovetio kaj la unuopaj socialismaj landoj post la senstalinigo.

La libro estas la plej ampleksa verko pri la temo. Ulrich Lins trarigardis imponan fontaron, inter ili ĝis nun ne atingitajn, fokusis en ĉiuj kavoj kaj elsuĉis ĉiujn medolojn. Li publikigas multajn (ankaŭ ĝis nun ne konatajn) fotojn intertekste. La divido je ĉapitroj kaj subĉapitroj bone orientas la leganton, abunda piednotaro alkondukas al fontoj por plua enprofundiĝo, indekso de nomoj faciligas la reserĉadon. Kronologia tabulo vicigas ankaŭ fonajn eventojn historiajn. La formato de la libro kvazaŭ invitas al enmanigo. Ĉio estas donita, por ke ĝi iĝu praktika manlibro por ofta postfoliumado.

Ĝi taŭgas ne nur por fakinteresitoj, sed ankaŭ por la pli vasta publiko, ĉar Lins — majstrante stilon, proksiman al la konversa — glate kondukas nin — sen lacigo de la intereso — de temo al temo, ne ŝarĝante nin per legobremasaj balastinformoj (ilin transigas en piednotojn), bildece sursceniĝante eventojn kaj ties rolulojn. Apenaŭ troveblas Esperanta libro, kiu tiel atentus pri ekzakteco (verŝajne neniu nehungara presajo skribus kun ĝusta ortografio tiajn hungarajn nomojn, kiel Mezökövesd, Székeshérvár!).

Ni, esperantistoj devas koni la diversajn motivojn kaj kialojn de persekutoj kaj pri-Esperantaj superstiĉoj, por ĝustatempe kaj ĝustarime kontraŭbatali ilin. Pro tio, krom la menciitaj meritoj, kun sincera koro mi rekomendas la libron por ĉies bretoj, sed ĉefe manoj.

József Kiss Horváth

Ne kutimaj fabeloj

Petras Cvirka: Koko Kantisto Kokerikisto. El la litova lingvo tradukis Adomas Aitilavicius. Vilnis Vytury, 1987. 34 paĝoj. Prezo por Hungario: 25,- forintoj.

La volumeto prezentas stile kaj enhave similajn fabelojn, entute tri. Ĉiuj tri temas, laŭ la kutimo de popolaj fabeloj, pri mondo plenplena da vivdanĝeroj kaj teruraĵoj, kie sendefendaj mizeruloj vole-nevole frontas al ĉiupovaj potenculoj. Fabeloj ĝenerale konsolas, kuraĝigas la legantojn aŭ aŭskultantojn, fine glorie venkas mallertuloj kaj malfortuloj. Tute male en tiuj ĉi litovaj fabeloj: perforto atingas sian celon, ne venas eterna feliĉo. La destino estas blinda, la peoro ne evitebla. Eble speguligas tie historia sperto de malgranda popolo, kiun ĉiam subigis senindulge superpotencon havantaj najbaroj.

La lingvaĵo, la etoso de la fabelo memorigas la legantojn pri Kalevala:

„Klabon majstras li teruran
Draŝos felon la veluran”

Cetere bona poezia stilo determinas ne nur la versojn, sed ankaŭ la prozajn tekstojn, ankaŭ tiuj ĉi lastaj havas pulsantan ritmon, foje rimaĵojn tre agrablajn. Kelkfoje oni povas trovi versojn mallongajn pri pres-

kaŭ same ripetigantaj eventoj, ĉiukaze la modifoj estas sagacaj, interesaj, spritaj. Nur la unua fabelo (Kiel pego abion hakis) enhavas iom da nebuleco: La „-is” kaj „-as” tempoj estas iom intermiksita, oni ne povas vidi klare la vicordon de la eventoj. Iumomente ŝajnas, ke la abio estas jam hakita, sed baldaŭ poste oni devas supozi, ke ĝi estas nur hakota. Logiko stumbblas: la abio jam falis sur la teron, tamen la bestoj ankoraŭ petegas kompaton, do ne antaŭ, sed post la fatala evento. Grupo de esperantistaj infanoj antaŭ nelonge tradukis — kiel lernejan taskon — ĝuste tiun ĉi parton de la fabelo: nur tre malmultaj povis trovi konvenan traduko-solvon, la ceteraj miskompreniĝis. Spite al tiu ĉi mallonga parto misinforma, la senco de la fabelo klare disvolviĝas, certe ankaŭ antaŭ la infanoj mem: egoismo ne havas limon, superuloj laŭplaĉe povas fari ian ajn malbonon al subuloj, eĉ komuna kontraŭstaro vanas.

„Ci” vorteto en ĉiuj fabeloj estas: bestoj ĝenerale ci-parolas, sed ne ĉiam, estas videbla kelkfoje ankaŭ „vi”. Logike oni ne povas klarigi: laŭ kiuj kialoj anstataŭas iu momente „ci” „vin”, aŭ inverse? „Ci” havas nur teorie sencon intiman. Eĉ kiuj ĉiutage parolas Esperanton, denaskaj esperantistoj ne ciumas. Uzi ĝin en familia societo, inter amikoj pli multe signas ofend-intencon ol klopodon esti afabla, amikeca. Lernolibroj eventuale eĉ ne mencias „ci”, aŭ nur inter krampoj, flanke. Do ĝi apartenas al Esperanto-vortoj rare uzataj. En la tri fabeloj „ci” havas nenian estetikan valoron, ĝi estas superflua, stranga ornamaĵo, stilistika balasto.

Eble kelkaj esprimoj — krii vorte, iu komencas voĉi, fari krion —, vere tre malmultaj ne plaĉos al la legantoj, vortoj „forstisto”, „klafto” same ne, sed tiujn apenaŭ rimarkeblajn malglataĵojn rapide forgesigas la — cetere — subtila stilo, amuza rakont-maniero. Onidire „fino bona, ĉio bona”, sed la tri fabeloj ne havas bonan finon, spite al meritoj, la atendata feliĉo, almenaŭ premio je bono forestas. Tamen, de la komenco ĝis la fino, multaj, buntaj eventoj kaj fajna humuro ligas la intereson de la legantoj, tiel estas akceptebla ankaŭ la fino: kvazaŭ ĉio estus determinata de fizikaj leĝoj, kvazaŭ ĉio estus straba spegulbildo de la realo. En la dua fabelo (Ruzaĵoj de vulpo) honesta helpemulo, leporo-intelektulo pereas, li grandanime malkaŝas fiagojn, senkompromise plenumas ofican devon, donas bonajn konsilojn, tamen li fariĝas disŝirita. Lupo-maljunulo perdas sian hejmon. Dume senhontaj impertinentuloj, multnombra vulpo-familio, enlasita provizore nur pro kompato plene okupas domon kaj senhejmigas veran posedanton. Maljusteco venkas.

Nur fiagoj trafas celon, stulta konduto jam ne, ĝi alportas malfeliĉon, sed ankaŭ ĉi-okaze (en la tria fabelo) puno estas ne senpera. Vulpo formanĝas ne la fieregajn gepatrojn; viktimo fariĝas la senkulpa, kontraŭvole grasigita ido. Samtempe la kompatinda orfo, multe humiligita, malgraŭ senĉesaj maljustaĵoj — ankaŭ en tiu ĉi fabelo — akiras ne oron kaj bonon, nur eble-

con je diligenta laboro. Do la plej supra, ankoraŭ atingebla celo estas anstataŭ nekutima feliĉo nur simpla laboro.

Kvankam la libreto estas modestaspekta, tute ne luksa, en ĝi la ilustraĵoj estas rimarkindaj. La multkoloraj bildoj rememorigas la legantojn pri infanaj desegnaĵoj, ankaŭ pri hejmfaritaj pupoj, pri popolaj artaĵoj kaj fabrikado de multkoloraj ŝtofoj. Oni rememoras pri vilaĝa idilio, kie al harmonio samtempe apartenas bono kaj malbono en bunta vario.

„Koko Kantisto Kokerikisto” estas nepre aĉetinda, ĝi vekas la intereson de la infanoj kaj ĝi povos fariĝi unu el iliaj plej ŝataj libroj.

Ernő Csiszár
(Hungario)

Kolektaĵo amuza kaj pensiga


Oranĝa ombrelo. Mikronoveloj. Ĉina Esperanto-Eldonejo. Pekino 1986. 148. Prezo por Hungario: 50,- forintoj.

La libreto enhavas 40 t.n. mikronovelojn de 35 diversaj ĉinaj aŭtoroj. Tiuj estas mallongaj — parte eĉ malpli ol du paĝojn ampleksaj — rakontoj. Ili kondukas al vivmaniero kaj kulturo nekonataj por la plej multaj inter ni. Sed samtempe ili temas pri okazintaĵoj, spertoj kaj ecoj ĉiutage kaj komunhomaj, kiel malsano, edziĝo sen amo, malkonsento pri infana edukado aŭ morto. Multaj el tiuj mikronoveloj inkluzivas profundan veron de la vivo kaj instruan ideon: personoj kun abomenindaj ecoj estas honigitaj profunde en la fluo de la eventoj; he-rooj kun estimindaj ecoj fariĝas virtaj ekzemploj.

Tiel ni renkontas la amarigitan edzon de virino malsana jam de multaj jaroj. Li revidas konaton de pasintaj tagoj, kiu memorigas lin pri la tempo, kiam la edzino lin ofereme flegis dum malsano. La renkontiĝo ege pensigas lin kaj kaŭzas, ke plena de amo kaj komprenemo li denove zorgas pri sia edzino. Ni renkontas junulon, al kiu vendistino redonis tro multe da mono pro malatento. Li ne protestas kaj foriras. Sed poste, kiam honesta trovinto alportas al li la perditajn sportŝuojn, li pentas kaj reiras al la vendejo... Ni renkontas viron, kiu ne ŝaj-nigas esti altranguo antaŭ knabino — kiel amiko konsilas al li — sed konfesas esti simpla laborulo kaj kiu tamen (aŭ eble eĉ tial?) akiras la amon de la knabino. Kaj povas esti, ke ni renkontas nin mem en tiuj rakontetoj kaj leginte ilin ni pripensas la propran konduton:

La lingvaĵo estas flua kaj viva. Malgraŭ la multnombro da aŭtoroj kaj temoj la libro prezentas lingve harmonian tuton. Mi ĝin rekomendus precipe al la komencantoj de Esperanto: ili facile komprenos la enhavon kaj rapide pliampleksigos siajn leksikokonojn serĉante en vortaro eĉ nur du-tri vortojn po rakonto. Ankaŭ klarigoj pri tipaj aferoj de la azia kultursfero kontribuas al la facila komprenado, kiel ankaŭ la beletaj desegnaĵoj, kiuj krome donas al la libro suplementan, laŭaspektan ĉarmon.

Sabine Fiedler



Ŝanĝiĝis la impostado

Iam multaj ĉefoj kutimis vojaĝi por negocaj aferoj kune kun sekretariino — prezentante ŝin kiel edzinon.

Nuntempe oni kutimas alie. La ĉefo vojaĝas por negocadi kun sia edzino — prezentante ŝin kiel sekretariinon.

Kiaj ŝanĝoj!

- Kiel vi vivas, amiko, kun via nova aŭd-aparato?
- Bonege, dankon. De kiam mi uzas ĝin, mi jam kvarfoje modifis mian testamenton.

Novaj ŝancoj

- Mi denove edziniĝos post du semajnoj. Kaj miru: kun mia iama edzo!
- Do li grave ŝanĝis siajn kondutojn?
- Jes. Li fariĝis direktoro.

Malnovaj ŝancoj

- Karega filinjo mia! Se vi volas edziniĝi, ĉu vere kun tiu studento? Kiam vi ambaŭ ankoraŭ lernas?!
- Tio estas nia afero, paĉjo.
- Kaj kie vi loĝos kune?
- Ankaŭ tio estos nia afero.
- Kaj kiel vi subtenos vin?
- Tio estas jam via afero, paĉjo!

Lasta ŝanco?

Post la ceremonio la nova bopatro ekparolis:

- Do, karega bofilo, post kiam vi edzinigis mian filinon, espereble vi serioziĝos, kaj faros nenian... nu, aze-naĵon.
- Certe ne, paĉjo! — li respondas ĝentile. — Tiu ĉi estis la lasta...

La unua (Ne ŝanco)

- Mia karega, diru jam: ĉu vere mi estas la unua viro en via vivo?
- Ja klare ke vi, trezoro! Sed kial demandas tion ĉiu viro, mi ne komprenas!

GAJA PAĈO



Malnova ŝerco — sed bona

- Mirinde! Kial vi staras nuda meze de la ĉambro? — konsterniĝas la hejmen veninta edzo.
- Venas je neniun...
- Sed kial vi portas la ĉapelon?
- Nu, eble tamen venos iu...

Kaj simetria ŝerco

- Karega panjo — rakontas la knabinjo — imagu: Paŭlo grandioze kompetentas pri modo! Al li tute ne plaĉis mia robo, mi devis tuj demeti ĝin.

Por rapide fini (ankaŭ tiun ĉi paĝon)

- Petro, ne forgesu, ke post duonhoru mia edzo revenos!
- Nu, ni faris ja nenion...
- Ĝuste tial! Faru do rapide, jam ne hezitu!

Tiuj iamaj tagoj!

La delonge eksan teatreron demandas ĵurnalisto:

- Ĉu vi rememoras foje la iamajn belajn tagojn?
- Hm, prefere la iamajn belajn noktojn.

Ne ofendu!

- Akuzito! — parolas la juĝisto — via najbaro plendas, ke vi ofendis lin per ofendaj esprimoj.
- Sinjoro juĝisto! Ĉu vi kredas la dirojn de tiu kretena bubalo?

Gratulinde

- Post zorga testado mi devas informi vin — diris psikologo — ke viaj talentoj ne montras sin — bedaŭrinde — tro grandaj...
- Ĉu vi ne scias, doktoro, ke mi estas prezidanto de granda firmao?!
- Ho, tiukaze mi devas nepre gratuli, ke vi sukcesis per etaj talentoj akiri tian karieron!


Ervin Fenyvesi

Enigma enigmo

Ĉifoje por enkonduko ni sciigas nur tiom, ke temas pri libro. La titolon kaŝas: H.1., la subtitolon: V.13. kaj V.16; la aŭtoron: H.29; la eldonejon: H.67. (ensendendaj linioj). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

HORIZONTALA: 13. Certa jararo, 14. Kortbirdo (R), 15. Dolĉega trin-kaj', 17. Normala stato de organismo, 18. Persona pronomo, 19. Reen: konjunkcio, 21. Kontraŭe, 22. Prepozicio, 23. Familia prefikso, 24. Agrable kaj gajige distri (R), 25. Kaŭzi, ke io konkreta estiĝu (R), 26. Malgrandiga sufikso, 27. Radiumo (kemia simbolo), 28. Antikva greka moneret', 30. Identigas, 32. Reen: id' de musĉasanta dombesto, 35. Io ne normala, 36. Numeralo, 37. Poŝtkesto, 38. Nekultivatan plugkampon, 39. Rehavigu al si, 41. Identaj de trinkujo, 42. Dua silabo de H.46., 43. Homfigura pupet', 44. Colo-ero (en brita sistemo), 46. Monto, kie loĝas la muzoj, 47. Havi rezulton (R), 49. 1056 — per romiaj ciferoj, 51. Tabelvorto, 52. Sufikso por loko, 53. Kunfiksi metalajn pecojn (R), 54. Percepti per okuloj, 55. Verba finaĵo, 56. Valora metalo, 57. Mevo, 59. Reen: persona sufikso, 60. Komparativa konjunkcio, 61. Kare ŝatas, 62. Havigi al si, 64. Violkolor', 66. Estu fieral!

VERTIKALE: 2. Estos ies posedaĵo, 3. Havigi al iu, 4. Reen: vicmontra numeralo, 5. Ne — angle, 6. Komenciĝi, 7. Reen: radikio de H. 56., 8. Alĝustigi ion (R), 9. Verba finaĵo, 10. Reen: ne vin, 11. Arto desegni, 12. Plumprovizita pilko (R), 18. Reen: H.60. 20. Tia estas ekzemple V.5. a H. 26. 23. Ĉiutagan, ordinaran, 24. Komenco de la alfabeto, 27. Konstrustilo antaŭ gotiko (R), 28. Sino — miksate, 29. Sankta bildo kun artikolo, 31. Sidi sur ovoĵ (R), 32. Flugilo de aviadilo, 34. Trapasis, 37. Fari teknikan eraron en gazeto, 39. ...di (hastii), 40. Ne vira, 44. Persona pronomo kun vicmontra numeralo (2 vortoj), 45. Maljunulo, 48. Luebla kaleŝo (R), 50. Persona pronomo, 55. Prepozicio, 56. Malbona antaŭsigno (R), 58. Kune kun H.51.: diboĉo, 60. Grasa likvaĵ', 61. ...karega! — reen. 63. Azeneca tabelvorto, 65. Posteu!', 66. Nia sepa litero.



Solvo de la krucenigmo en la n-ro 1988/6.

El dek geedziĝoj nur unu sukcesas. — Mi ne scias, ja mi nur okfoje edziĝis. (el Gaja Paĝo)

Premion gajnis per lotumado:

S-ro Marcin Dabrowski, Inowroclaw, PL; s-ro Manfred Goldenbogen, Stralsund, GDR; s-ino Horváth Béliáné, Kalocsa, H; s-ino Lidia Lami, Livorno, I

I.Z.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

Vivi estas danĝere de István Nemere

Tiu ĉi libro — la deka Esperantlingva romano de la konata verkisto — estas aventura romano kun ĉiuj elementoj de la ĝenro.

1. Kiuj kvar francaj generaloj direktis la Organizaĵon de Armeo Sekreta?
2. Kian oficon havis s-ro Gerradi?
3. Kiel mortis Catherine Calling, patrino de Simon?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.



Solvoj de la demandoj en la n-ro 1988/6:

1. Hard estis korespondanto de Vespera Kuriero en 1965.
2. Gustav portis ĉinan porcelanan tetaron kaj kimonon al Lina.
3. Gustav estas elektronika inĝeniero.

Premion gajnis per lotumado: s-ro Andreo Lyskov, Moskvo, SU; s-ro Per Johan Krogstie, Lóten, Norge. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

S-ro Romas Cibas (33)

ktm, pri abelbredado. *Anyksčiai* Azvozeriai, Litovio SU-234.930. — Lernantino Joanna *Kalinowska* (17) pri turismo, literaturo, mod.muziko, kol. bk. *Wroclawek* str. Purmana 69-83m20, PL-87-800. — Studentino Agata *Gajowa* (20) pĉt. *Stanin* Kopina 3, PL-21-422. — S-ino Daniela *Sevciková* (21) kun filineto, int. libroj, filmoj, mod. muziko, modo, manlaboroj, kuirado. Prefere kun hungarino. *Slov V Moravském Krasu* 37, CS-679-13. — Studentino Kataryna *Chwiatkowska* (22) pĉt. *Katowice* ul. Myslowicka 7/36, PL-40-486. — Jacek *Zajac* (25) laboristo, komencanto, pri muziko, folkloro, turismo, kol.bk. *Warszawa* Broniewskiego 91/1, PL-01-876. — Teknikistino de fizioterapio interŝ. pm, bk, ktm. Dorota Szalajda (22). *Zaluz* Bykowce 81. PL-38-534. — Instruistino Wanda Tarkowska (30) pri literaturo, turismo, kol. bk. *Otwork* ul. Poniatowsk. 3/71, PL-05-400. — Mikaelo *Saakjane* (26) ktm, pri muziko, kulturo, vivmanieroj, psikologio, lingvoj. Kol. urbo-bk. *Liepaja* str. Pasta 12-23. Latvio SU-229.700. — Lernantino Ewa *Strelczyk* (18) pri geografio, muziko, turismo, kol. pm, moneroj. *Slupca* ul. Kilinskiego 18/27. PL-62-400. — Cseh-kursanoj (18-50) ktm, pĉt. *Nowy Sacz* Al. Wolnosci 23, Esperanto Ĉehkurso, DKK. PL-33-300. — Instruistino Urszula *Sienkowska-Ciech* (26) kaj ŝia edzo, pri kino, literaturo, turismo, filozofio, pedagogio. *Augustów* ul. Gesia 2/15. PL-16-300. — Studento Andreo *Ivanov* (21) ktm, pĉt. *Krasnojarsk* ul. L. Kechoveli 58-83. SU-660.028. — S-ro Jacek *Opacki* (26) fraŭlo, pri sporto, E-libroj, kol. pm, kun hungarinoj. *Kwidzyn* ul. Spółdzielcza 16/31. PL-82-500. — Instruistino Danuta Antonewska (27) pĉt, ktm. *Stangard* Armii Lud. 6/2, PL-73-110. — Pavel *Nechvile* (47) por koni mondon per bk kaj informoj, pri ĉio. *Pardubice-Rosice* Fügnerova 233. CS-533-51. — Teresa *Kubiak* (30) pri mezepoka hist. kol.pm, brodaĵ-planoj, kun malproksimaj landoj. *Jastrzebie* Z. ul. Ruchu Oporu 45/2. PL-44-335. — F-ino Mirosława *Bak* (21) studentino, kun gejunuloj, pri E, muziko, kino, pentroarto, literaturo, vivo de homoj. *Slawsk* 30. PL-62-585. — Oficistino Elzbieta *Kemblowska* (30) pri lit., muziko, E-movado, turismo, legado de bonaj libroj, kol. libroj, sondiskoj. *Łódź* ul. Aleksandrowska 16m56, PL-91-120. — Teknikisto Wiktor *Lebiedz* (32) fraŭlo, pri teatro, kino, muziko, liter. *Jelenia Góra*, ul. Rózyckiego 23/128. PL-58-506. — F-ino Ĵivile *Jonuŝevičiute* (19) ktm. Palanga, J. Janonio 8-22. Litovio SU-235.720. — Krzysztof *Kleban* (19) fraŭlo, pri liter., turismo. *Slupsk*, ul. Koszalinska 10/116. PL-76-200. — F-ino |disława Kosiór (22) pĉt. *Jastrzebie* ul. Wielkopolska 53/34. PL-44-335. — F-ino Anna *Kowalewska* (24) pri geografio, muziko, sporto, turismo, kol. bk. *Warszawa* ul. Hawajska 18m6. PL-02-776. — Instruistino Maria *Banduch* (27) komencanto, pri geografio, historio, religio, kol. mapoj, albumoj, bk, mineraloj — kun geinstr. de geografio, migrantoj k.a. *Olszyna* Herby Stare, Zielona 8. PL-

42-720. — Oficisto Andrzej *Mazurek* (32) pri liter., historio, muziko, turismo. *Siedlce* str. Chrobrego 15/44. PL-08-110. — S-ino Veselka *Nenĉeva* interŝ. revuoj, suveniuroj, bk, pm. *Sevlievo* Centro-Poŝto-restante, BG-5400.

LETERKESTO

Radio-FMR, Esperanto-Redakcio, Toulouse, F: Via junula stabo, lerte propagandante, precipe tra la internacia „Rok-movado” pere de E-Rok-muziko, vekis interesiĝon ankaŭ ĉe ni. Se via asocio „Eurokka” sukcese produktos kasedojn kaj diskojn, k.s., probable ampleksiĝos — pretere — via aŭskultantaro (89 Mhz, sabato 10,30 h MET) pro la bunta E-programo. Informu nin foje pri la E-Rokkoncertoj kaj turneoj, kiujn vi estos organizintaj, ja ili certe vigligos plurloke la junularan movadon en E-ujo. Por interesiĝantoj jen via adreso: F-31.200, Toulouse, 9 bis Av.Fr.-Estébe.

S-ro Jakob Samsiev, Samarkand, Uzbekistano SU: Laŭ niaj spertoj la listoj de korespondemuloj neniel spegulas la esperantistaron de iu lando. Diversaj motivoj povas konduki iun ajn por anonci sin, same por entute akcepti regulan korespondadon. Tia estas i.a. la tute ne negativa fakto, ke li jam havas (sufiĉe) da korespondantoj, kaj pluajn ne deziras por si... Memkompreneble, se oni ne trovas en tiaj rubrikaj konvenajn partnerojn, prefere oni mem anoncu sin (kion vi ja faris), kaj la afero ekiros sur la vojo de la solvo. Indas cetere konscii, ke troviĝas ĉie ajn multaj personoj (precipe mezaĝuloj), kiuj pro tempomanko ne tre inklinas al leterŝanĝoj.

S-ro Václav Pospisil, Zelezny Brod, CS: Laŭ niaj konoj, en Prago la Hungara Librejo vendas E-librojn de HEA, eĉ se ne la tutan gamon. Koncerne la samcelan vendadon ĉe ĈEA, ŝajnas pli celtraf viaflanke, se vi turnos vin al ĝi, kaj petos tie detalan informon pri la aĉeteblaj libroj, eventuale katalogon. Ni estas certaj, ke vi ricevos kompletan informon pri la importado de la E-libroj eldonitaj de HEA.

S-ro Alex d'Oliveyra, Amsterdamo, NL: Dankon pro la rekonaj vortoj koncerne H.V.-n, kaj aparte pro viaj rimarkoj. Varme ni deziras kompletan kaj plej baldaŭan resaniĝon!

S-ro Vladimir P. Nikitin, Solneĉnij, Jakutio, SU kaj aliaj: Peranton en via lando ni ne havas. Tion fakte plenumas *Sojuzpeĉatj*, kie eblas sen ia limito aboni nian revuon, kaj tute same en ĉiuj grandaj poŝtofacejoj en Sovetunio. Bonvolu do utiligi tiujn fakte vastajn eblojn por aboni kaj abonigi inter la esperantistoj nian revuon, kiu fariĝas jam tutmonde pli kaj pli populara pro ĝia plurfaceta enhavo.

★ HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik • Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan McGill, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro György Nanovszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. • Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk • H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. • Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtofacejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. • Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. • Presis la Presejo de HEA. *Indeksám:* 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

MÉMMI Agrinprop Iroda, Gödöllő — 329/89.



Sidejo de IKV




Nova kvartalo
de Tatabánya



IKV

Entrepreno
kiu
prizorgas
la domojn
en urbo
Tatabánya

2801 Tatabánya
Erdész u. E
360-21055
Telefon: 11-522



KOLOR-TELEVIDILO „THOMSON”

frekvenco-sinteziga agordigo • mikroprocesila regado

Miniaturaj rezistiloj, kondensiloj (MELF) kaj larĝ-skale integritaj cirkvitoj estas aplikataj en ĝi. La muntado, la ĝustigoj kaj la kontroladoj dum la fabrikado estas plenumitaj permaŝine sub komputila regado.

VIDEOTON

H-8001 Székesfehérvár, Berényi út
Pf. 104.
Hungario

Telefono: (36 22) 12-730, 13-030
Telekso: 21-331 h

1989 JUL 3